## *RECENZO:* **Survoje al Universala Civilizacio**

Giordano MOYA (ES)
Barcelona Esperanto-Centro, 1995, ISBN 84-605-3105-8, 205 p.

Trastudinte la libron mi konstatis, ke al la titolo mankas demandosigno. Kial? Nu, la autoro skribis la libron por respondi la demandon "Kien iras la homaro?" kaj do "Ĉu ĝi estas survoje al universala civilizacio?" (au ĉu ekzistas prudenta alternativo al tio).

Elirante de la naturo de la vivo la autoro skizas la naturon de la homo, kondukante nin tra la tuta homa historio de Sumero kaj Ateno ĝis la nuntempo, kaj jam en la enkonduko (p. 7-10) li konfrontas la leganton kun la jenaj konstatoj kaj konkludoj: "Milito ... estas grava, kerna faktoro en la proceso de la socia evoluo." ... "Nura nemilit-emo ne sufiĉas por garantii la pacon." ... "Ni ekzamenos la militfenomenon kun ties sociaj implikoj, por eltrovi la vojon al paco." ... "Ĉu vere la milito apartenas al la propra naturo de la homo?" ... "Bedaurinde, la naturo de la milita perforto estas profunde ligita al la tuta disvolviĝo de la civilizacio. ĝis kiam? Eble, kun la apero de la atomenergio, la civilizacio de la milito alvenis jam al sia plena disvolviĝo. Tial nun, au la homaro generas tute novan civilizacion, au ĝi alvenos al sakstrato, al civilizacia disfalo kaj pereo." ... "La precipa faktoro kauzanta militon kuŝas sur la konkurado. Sen tiu analizo ne eblas aliri la radikojn de la milito." ... "Nur enprofundiĝante en la kernon de tiuj du sociaj faktoroj, la konkurado kaj la solidareco, oni povas antaueniri sur racia vojo, kaj koncepti solvon al la socia fenomeno nomata milito."

Se vi, kara legonto, nun sekvas la autoron tra la historio, vi trovos multajn ĝustajn konstatojn kaj konkludojn apud banalaĵoj kaj nepre diskutindaj, ja eĉ disputindaj asertoj. Tiel, ekz. pri la rolo de la religioj en la historio, ni legas sur p. 124: "La religioj plenumis du grandajn rolojn en la socia evoluo: bremsi niajn bazajn instinktojn ligitajn al la besteco, kaj certigi la stabilecon de la socio. ... La religio do estis la kultura bazo de la homa kunvivado." Jes, sed tio ja estas nur la duona vero. Kio pri la religio kiel nura rimedo au preteksto por akiro kaj ampleksigo de potenco kaj ĉi-konekse por tenado de la popoloj en nesciado, senklereco?



En la ĉapitro pri la Unua Mondmilito (p. 66) ni legas pri la kauzoj de militeksplodo: "... la fundamentoj de la ŝtatoj estas la armeoj kaj tiuj ne povas esti ĉiam pasivaj. Sen militoj la armeoj ne havas okupon." Kaj sur p. 67 la autoro bedauras la regantojn same kiel la regatojn: "... fakte ili estis nuraj kompatinduloj trenataj de preskau natura historia ŝtormo". Pri la mondskale ĵus (provizore!?) fiaskinta socialismo ni legas i.a. sur p. 128: "... kaj tiu nomata scienca socialismo, lau sperto, turniĝis en plej abomenan diktaturon kaj mizere disfalis". Kaj sur p. 131: "Nuntempe oni povas sperti, ke, esence, la naziisma kaj komunisma diktaturoj ne tro diferencis inter si. Ili ambau estis totalismaj, kaj en ili la homaj rajtoj ne ekzistis".

Kiel iama civitano de unu el tiuj abomenaj diktaturoj minimume du rimarkigoj ŝajnas al mi necesaj. Unue mi neniam audis, ke en GDR oni industrie ekstermis milionojn da supozitaj kontrauuloj, kiel en la faŝisma diktaturo sub Hitler. Kaj due, se oni ĝeneralige asertas, ke homaj rajtoj ne ekzistis, oni ja devus difini, pri kiuj rajtoj oni pensas. Mi tre bone spertis la limigojn de homaj rajtoj en GDR, sed aliflanke esencaj homaj rajtoj, kiel la rajto je laboro kaj la rajto je loĝejo, estis garantiataj (kontraste kun la nuna t.n. burĝa demokratio).

Jen fine kelkaj citaĵoj, kiuj spegulas la rezultojn de la trastudado de la homa historio fare de la autoro:

1. "Fakto estas, ke la homa socio estas pli konkura ol solidara."(p. 172)
2. "Mankas spirita ideoforto kapabla veki la konscion pri la neceso de libera homara unuiĝo kadre de federacio de popoloj." (p. 138)
3. "Nun ne eblas prognozi la futuron." (p. 183)
4. "Tiu estonteco (do, la universala civilizacio, rim. de la recenzinto) devas esti kreata per konscia kolektiva agado ... kiel kolektiva devo." (p. 193)

5. "Sen scio kaj bonvolo ne eblas konstrui novan universalan civilizacion, ĉar, fakte, la socio spegulas la kvalitojn de la homoj, kiuj konsistigas ĝin." (p. 194)

6. "Tiu kultura movado (en la senco de la spirita ideo-forto, rim. de la recenzinto) ekzistas jam, ĝi estas la esperantismo kun sia supernacia lingvo Esperanto kaj ties ideologio, la homaranismo." (p. 200)

Ĉi tie ne estas la loko por denove diskuti pri tio, kio estas esperantismo, sed tutcerte la esperantistoj ne reprezentas unu ideologion, la homaranismon (se oni entute rajtas nomi homaranismon ideologio). Tiom pri la enhavo de la libro.

La lingvaĵo ne estas kontentiga. Krom svarmantaj preseraroj kaj iom arbitra metado de komoj ĝenas kelkaj lingvaj eraroj, ripetiĝantaj tra la tuta libro. Tre ofta estas malĝusta uzado de la akuzativo kaj mankanta nombra konformeco (singularo resp. pluralo) inter substantivo kaj atributiva au predikativa adjektivo. Ĝena estas la daura uzado de "tio" anstatau "la" en frazoj kiel "La plej grava estas..." kaj la uzado de "nomata" anstatau "tiel nomata". Tipe hispana ŝajnas la erara "e" ĉe la vortkomenco (estarigi, estrukturi, Espartako, Eslovenio), sed inverse mankas la komenca "e" ĉe "establi". Ankau kelkaj propraj nomoj estas malĝustaj (Bismarch, Hinderburg).

Resume: post la legado de la libro mi unue bedauris, ke mi ne havis partner(in)on por diskuti kun li/ŝi pri la problemoj, prezentitaj en la libro, kiuj ja estas ege gravaj, ĉar ili tuŝas la transvivon de la homaro entute. Ni danku al la autoro, ke li dediĉis sin al tiu plej grava demando. Dezirindas seminario pri la temo, por kiu la libro bone tagus kiel baza materialo.

Adreso de la recenzinto:
Dieter DUNGERT
Olvenstedter Grund 25
DE-39130 MAGDEBURG
GERMANIO



*RECENZO*

**Steven PINKER**
*The Language Instinct: How the Mind Creates Language*
*William Morrow and Company, New York (US) 1994*

**La Lingva Instinkto: kiel la Spirito Kreas Lingvon**

germanlingva traduko de Martina Wiese
editita en Kindler Verlag GmbH, München (DE) 1996
ISBN 3-426-40267-X (560 p. 49.80 DEM)

*St. Pinker*, psikolingvisto en la famekonata *Massachusetts Institute of Technology (MIT), Boston*, faras hipotezon: homoj de ĉiuj etnaj grupoj, ekzistantaj kaj formortintaj, estas kaj estis provizitaj per ennaskigita lingvoinstinkto. Ĉu ekzistas pruvoj por tiu eldiro, ke la homa lingvo estas heredigebla parto de la biologia ekipaĵo, komparebla al instinkto, ke la lingvo havas minimume ennaskigitan komponanteron?

Lingvo kiel speco de instinkto estis menciita la unuan fojon jam 1871 de *Darwin*. La denova ideo baziĝas ne nur sur pli fruaj teknikaj analizoj de la frazstrukturo, sed sur rektaj observadoj de la ĉiutaga t. n. primitiva lingvouzo. Jam 3-jaraj infanoj scipovas ĉirkau naudekprocente ĝuste formi frazkonstrukciojn, kiujn ili antaue neniam audis - ili evidentiĝas gramatikaj geniuloj, tute kontraue al aliaj kapabloj en tiu aĝo. Lau *Chomsky* infanoj devas esti provizitaj per ennaskigita plano, kiu estas komuna al la gramatiko de ĉiuj lingvoj. Tia universala gramatiko (en la senco de prilaborado de informoj el la ĉirkauaĵo) ŝajnas esti al *Pinker* "mentala softvaro", kiu en la unuaj vivjaroj devas esti programata per iu parolata lingvo, ĉu japana ĉu araba.

Ekzistas en la ĉ. 6000 lingvoj (de *L. L. Cavalli-Sforza* kunigitaj en 24 lingvofamilioj - genetika arbo lau gengrupoj) ne nur multaj idiosinkrazioj, sed ankau frapantaj universalaĵoj de hipoteza universala gramatiko *(N. Chomsky)*, formuligeblaj kiel implikaĵoj